Diplodocus

Diplodocus (el greka "duobla trabo")[1], en Esperanto **diplodoko**, estas genro de dinosaŭroj de la subordo saŭropodoj kaj familio de diplodokedoj, kiuj vivis fine de la geologia periodo Ĵurasio, antaŭ proksimume 150 ĝis 147 milionoj da jaroj, nome dum la Kimeriĝano kaj Titoniano, kie nun estas Nordameriko.



Komparo de grandoj kun homo.

Enhavo

Ĝeneralaĵoj
Priskribo
Historio
Klasigo
Paleobiologio
Paleoekologio
Notoj

Ĝeneralaĵoj

La unuaj fosilioj estis malkovritaj en 1877 de S. W. Williston. La genra nomo, stampita de Othniel Charles Marsh en 1878, estas la formo en novlatina deriva de la greka διπλόος (*diploos*) "duobla" kaj δοκός (dokos) "trabo",[1] reference al la formo de la ostoj laŭlonge de la suba parto de la vosto. Tiuj ostoj estis supozataj nuraj de *Diplodocus*, tamen oni amlkovris ilin ankaŭ ĉe aliaj membroj de la familio de la diplodokedoj kaj en saŭropodoj nediplodokedoj kiaj la *Mamenchisaurus*.

Vivis kie nun estas la okcidento de Nordameriko dum la periodo Supra Ĵurasio. La *Diplodocus* estas unu el plej komunaj dinosaŭroj de la supra parto de la Kuŝejo Morrison, nome sekvenco de maraj kaj aluviaj tavoloj el ĉirkaŭ 150 al 147 milionoj da jaroj. La Kuŝejo Morrison montras etoson kie hegemoniis gigantaj saŭropodoj kiaj *Camarasaurus*, *Barosaurus*, *Apatosaurus* kaj *Brachiosaurus* krom la *Diplodocus*.[2]

La *Diplodocus* estas inter la dinosaŭroj plej facile identigeblaj, pro sis klasika formo, kun longaj kolo kaj vosto kaj kvar fortikaj kruroj. Dum multaj jaroj, ĝi estis la dinosaŭro plej granda konata. Ties grando eble malhelpis la predantojn *Allosaurus* kaj *Ceratosaurus* kies restoj estis trovitaj en la samaj tavoloj, kio sugestas, ke ili kunekzistis kun la *Diplodocus*.

Priskribo

Historio

Klasigo

Paleobiologio

Paleoekologio

Notoj

1. ↑ 1,0 1,1 Liddell & Scott, 1980, Greek-English Lexicon, Abridged Edition, Oxford University Press, Oxford, UK, ISBN 0-19-910207-4.
2. ↑ Christine C.E. & Peterson, F. (2004). "Reconstruction of the Upper Jurassic Morrison Formation extinct ecosystem—a synthesis". Sedimentary Geology **167**, 309–355

Elŝutita el "https://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=Diplodocus&oldid=5877742"

Ĉi tiu paĝo estis lastafoje redaktita je 07:39, 28 jan. 2016.

La teksto disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 3.0 Neadaptita; eble aldonaj kondiĉoj aplikeblas. Vidu la uzkondiĉojn por detaloj.